# EKO 2025

Melodia
Muzika
numero

EKO 2025-48. Dec 25. Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Alkroĉaĵo Sume ? KB

## Nova albumo de Vinilkosmo




Jen la Oficiala apero de la albumeto *La MondAnoj* la 18-an de novembro 2025
La albumeto disponeblas elŝute en la muzikplatformo de Vinilkosmo kaj en la kutimaj aliaj elsendfluaj platformoj.
Legu pli pri tiu eldono ĉi tie: La MondAnoj https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/474-oficiala-apero-de-la-esperanto-bita-albumeto-la-mondanoj-la-18an-de-novembro-2025.html

## Monera katalogo survojas

Kiel fondinto, en 2014, de la unua fakgrupo pri Esperanta Numismatiko kaj finredaktoro de la grupa revuo (mi kunsendus al legantoj la pli freŝan numeron de la 12-a jarkolekto), mi volas peti al vi kunlabori, mencionte ekde nun al ni kaj aliaj legantoj novaĵojn pri numismatikaĵoj esperantaj kiel pagiloj kaj medaloj, aktuale eldonitaj okaze de eventoj kiel jubileoj ktp. Viaj eventualaj artikoloj tiurilataj ricevos lokon en nia rubriko “Retpoŝto”. Mi dume preparas la unuajn esperantajn Katalogon kaj Terminaron.

Bert Boon, Belgio

## Nederlanda pioniro



La 2-an de decembro 2025 forpasis Eduard Borsboom (1936-2025) nederlanda lingvoinstruisto kaj esperantisto. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/12/borsboom/

## Muzikaj genroj

Oni foje enesperantigas nomojn de tipoj de muziko laŭ la sono en naciaj lingvoj, sed estus pli klare kaj facile traduki anstataŭe laŭ la signifo. Ĉu vi konas aliajn faciligindajn muzikstilojn? /Vidu la bildon sekvapaĝe




## Danko al SMG kaj EKO de nia prezidanto

Koran dankon, kara Stefan! Dankon ankaŭ al vi pro via laboro kaj fideleco!

Fernando Maia Jr, **Universala Esperanto-Asocio |** Prezidanto

-

## Korea kontribuo

Seula Esperanto-Kulturcentro havas regulan zoom-renkontiĝon en ĉiu dua vendredo dufoje monate. La 69-a Venzo (Vendreda Zoomo) okazos en la 5-a (vend.) de decembro 2025 je la 21-a horo (UTC 12-a horo) dum 90 minutoj. La temo estas 'Kio okazis ĉe vi aŭ ĉirkaŭ vi dum du semajnoj?' La temo estas simpla sed temas pri nia ordinara vivo. Iu ajn povas aliĝi eĉ sensciigo, se li/ŝi volus paroli en Esperanto. Jen estas zoom-adreso.

**https://us02web.zoom.us/j/85100249337**…

ID: 851 0024 9337; PASKODO: saluton

## Osmo Buller festas sian 75-an



Antaŭ 75 jaroj, la 12-an de novembro 1950, naskiĝis Osmo Buller, finna politikisto, kulturoficisto kaj esperantisto (ekde 1966), longtempa (ĝenerala) direktoro de UEA. Ni gratulas lin okaze de la jubileo kaj deziras al li plurajn serenajn vivojarojn! Legu pli en La *Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/11/buller-3/ kaj gratulu lin.

## Gastoj al Herzberg – la Eo-urbo

Agrablan tempon ni pasigis kun kelkaj lastatempaj vizitantoj en Esperanto-Centro Herzberg. Dankon al Andy el Kubo, al Maya kaj Diana pro la kontribuado al niaj klubkunvenoj kaj lingvolernado, kaj riĉigo de la ĉiusemajna kluba programo. Gastoj, vizitantoj estas ĉiam bonvenaj.

## Universitata forumo inter Ĉinio kaj Koreio

Novembre en la Ŝanhaja Universitato de Internaciaj Studoj okazis la sepa Esperanto-Forumo inter Ŝanhajo kaj Seulo kun 90 partoprenantoj. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/11/chinio-26/



## Pollando volas akcepti afrikanan petanton

Unu el la aktivaj afrikaj esperantistoj, edukisto, ege deziras partopreni la nun komenciĝontan 7-monatan Esperanto-kurson de la Jagelona Universitato, por plibonigi sian lingvokonon, instrui, povi pli aktive partopreni en internaciaj kulturaj kaj edukaj projektoj kaj havi oficialan konfirmilon de la fama eŭropa universitato. Tiu dokumento helpus lin en kontakto kun edukaj instancoj. Bedaŭrinde, lia financa situacio ne ebligas pagon por la kurso. Temas pri 236 eŭroj.

Miaopinie, valoras helpi lin. Se ni trovus kvin personojn, kiuj pagus al la universitato po ĉ. 50 eŭroj, estus kolektita la necesa sumo. Se oni pagas per Wise, la sendokosto estas tre malalta.

Mi apenaŭ kuraĝas proponi helpon, sed la partopreno en la kursoj de la Jagelona Universitato en la antaŭaj jaroj de kelkaj afrikaj aktivuoj, kiujn helpis private iuj esperantistoj, montris, ke tiuj afrikanoj estis diligentaj studantoj, efike altigantaj la nivelon de sia lingvokono. Kio rimarkeblis aparte, estas la enhava profundeco de iliaj ideoj, videbla en iliaj kursaj eseoj. Helpo al tiaj personoj estas sencohava.

Eble vi konas neesperantiston, kiu emas helpi. Ni memoru, ke afrikaj esperantistoj agas ne nur por nia lingvo. Ili ankaŭ helpas la socion pri edukado de infanoj, profesia kapabligado de virinoj, zorgado pri orfoj k.a.

Kaj eble, okaze de la alproksimiĝantaj festoj, iu emus fari bonon (tia tradicio ekzistas en diversaj landoj). Kandidatojn por helpi kaj esti por ĉi tiu unu okazo "Amiko de Afriko" mi informos, pri kiu temas. Bv. kontakti min. La tuta transpaga afero estos sciigata al ĉiuj engaĝintoj.

Maria Majerczak

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE), Perlo Miela (HU)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Kvardek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.